



AVE estis fondita Marto 1984 en Liège okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. El la fondintoj: Maire Mularney (1922 - 2008, la koro de AVE, kunfondinto de la irlanda Verda Partio), Christopher Fettes (unua redaktoro de AVE-NOvajhoj, AVENO), Jean-Claude Thumerelle (unua sekretario), Wolfgang Guenther, Ute Haas, s-ino Paintner-Trumpp, Emilo Mas & Claude Rouget (kiu eldonis VERDire). Je la kongreso en Zuriko 1991 Manfred Westermayer transprenis la AVE-sekretarion. Ni kunlaboras ekde 1984 kun la Eŭropaj Verdaj Partioj por respekti Esperanton kaj esplori ties potencialon; ni regule partoprenas la verdulajn kongresojn kaj prezentas Esperanton. AVE-anoj kunvenis enkadre de la kongresoj de Esperanto kaj de la Federacio de la Eŭropaj Verdaj Partioj. Bonkvalita interpretado de la ĉefaj prelegoj i.a. en Esperanton okazis 1991 je la unua Europa Kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko de Farjon de Lagatinerie kaj Claude Piron, kion ebligis niaj geamikoj el Francio kaj la svisa Verdulo Hans Beat Schaffner. En 2017 AVE havas ĉ. 350 membrojn tutmonde, parte ili estas anoj de Verdaj Partioj. Por havi realajn sukcesojn necesas, ke multe pli da esperantistoj agadas en la Partioj.

AVE kunlaboras ankaŭ kun diversaj Esperanto-Organizaĵoj kiel UEA, SAT, EEU. Ni kontribuas pere prelegoj enkadre de kongresoj, ekz-e pri la temo „Agendo 21“, "Akvo kaj plastaĵoj", „Alternativoj kontraŭ Atomenergio“.

Verda Filozofio de AVE: Realigo de pensado kaj agado laŭ la principo, ke la vivo kaj ne (sole) la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ĉiu evoluo sur tiu ĉi planedo. Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj "lingva neŭtraleco" kaj "mondvasta aplikebla facileco" adekvatas al la ekologia principo "Eta estas Bela".

Celoj de AVE:

- * Uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel internacia komunikilo ene de Verda Movado, movado bazita sur ekologiaj, socialaj, baz-demokrataj kaj pacemaj principoj.
- * Peranta agado inter la Verda Movado kaj la Esperanto-Movado.
- * Enkonduki en la UEA-statuton la amendon, meti la "ekologiajn necesojn kaj bezonojn, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj" en la saman rangon kiel la nociojn de paco kaj de Homaj Rajtoj.

AVE-reprezentantoj partoprenas ankaŭ je la tutmondaj verdaj kongresoj (Canberra 2001, Nairobi '07, Sao Paulo '08, Dakar '12), kies Charton ni tradukis: www.globalgreens.info/globalcharter.php Sur pluraj retejoj de Verdaj Parti-Organizaĵoj troviĝas ligo al Esperanto (vidu sube). La germanaj Junaj Verduloj prezentas sin en Esperanto kaj informas prie: www.gruene-jugend.de Dum la 90-aj jaroj ĝis 25% de la Verdaj Eŭro-Parlamentanoj subtenis Esperanton - la Pirlot-Listo.

AVE ofte tradukas gravajn tekstojn pri ekologio, verda ekonomio, sociala justeco, paco, Homaj kaj Bestaj Rajtoj en Esperanton, NRO-oj, <http://vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/>

1984: Europ-vasta afiŝo de la Verduloj montras „Atomenergio - ne Dankon ! kaj aliaj 40 lingvoj

1999: Francio - Verda Partio notis Esperanton en sia Eŭropa Programo sub "Lingva Politiko":

1. Esplori la uzadon de Esperanto kiel ponto-lingvo por la internacia komunikado.
2. Esplori la potencialon de Esperanto ene de la Eŭropa Unio.
3. Esperanto en lernejoj kiel elektebla lingvo.

Esperantistoj agadas en komisiono de Les Verts en Francio: lesverts.fr/article.php3?id_article=645

2001: Partopreno en la kongreso kaj traduko de la Tutmonda Ĉarto de la Verdaj Partioj (Canberra)

2002: La germana Verda Partio "Bündnis 90 / Die Grünen" akceptis nian amendon por la Baza Programo (p.158): "Sprachen sind ein schützenswertes Kulturgut und sollen auf allen Ebenen Europas gepflegt werden: Von den Dialekten, regionalen und Minderheitensprachen sowie nationalen Sprachen

bis hin zu den übernationalen Sprachen." En la diskutlibro "grün 2020" troviĝas sprita eseo de Britta Loose pri "Esperanto in Europa 2020" . La germanaj junaj Verduloj ghis ch. 2010 havis ampleksan paĝon en Esperanto, kaj nun vi trovos ligan: <https://gruene-jugend.de/grune-jugend-internationale/>

2006: Europa Verda Kongreso en Ghenevo; ni tradukis la programon: www.europeangreens.eu

2008: AVE organizis laborgrupon ene de la Eŭropa Verda Somer-Universitato fine de Aŭgusto en Frankfurt/Oder & Slubice. Ĝi estis bone vizitata (legu pli en Aveno 33) - ni resoluciiis::

1-e. Inviti Verdan MEP-on al la Geremek-Grupo de la EP, por kune puŝi rolon de Esperanto en la lingvo-lernado (propedeutika utilo) kaj cele al eŭropa identeco (evidente momente ne aktiva grupo).
2-e. Esperanto estas vivanta lingvo kun propra kulturo (originala kaj tradukita literaturo, teatro-verkoj, kantoj kaj kanzonoj, denaskaj parolantoj, pacema historio kaj lingva evoluo.
3-e. Postuli ke la Komitato por Kulturo kaj Edukado de la Eŭropa Parlamento mendu sciencajn esploron pri la "Kontribuoj de Esperanto al la Inter-Kultura Dialogo".

2009: Por la Eŭropa Programo 2009 la germanaj Verduloj akceptis la amendoproponon de AVE: "Kulturelle Vielfalt ist lebendig und darf nicht auf reine Folklore oder den Namensschutz von Camembert, Feta und Halloumi reduziert werden. Basis und Ausdruck der kulturellen Vielfalt sind die Sprachen Europas – nicht nur Sprachen der Mehrheitsgesellschaften, sondern auch der Minderheiten sowie Esperanto als internationale Sprache der Völkerverständigung. Mehrsprachigkeit ist stark zu fördern." http://www.gruene.de/fileadmin/user_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/

Traduko: "Kultura multeco/diverseco estas vivanta kaj oni ne rajtas redukti ĝin al nura folkloro aŭ al protekto de merkataj nomoj kiel Kamemberto, ... La bazo kaj esprimo de la kultura multeco estas la lingvoj de Eŭropo, ne sole la lingvoj de la plimulto-socioj, sed ankaŭ de la minoritatoj kaj krome Esperanto kiel internacia lingvo de la interpopola komunikado. Plurlingveco estas forte subtenenda."

2009: La komuna frakcio de la Verduloj, Regionalistoj kaj Piratoj ricevis 55 seĝojn en la Eŭropa Parlamento: Esperanton scias Reinhard Buetikofer (V) kaj parolas Malgorzata Handzlik (EPP).

2010: Mara Timermene partoprenis por AVE la European Verdajn Konsilion en Tallinn.

2011: En Parizo internacia teamo de AVE partoprenis la European Kongreson de la Verdaj Partioj.

2012: Global Greens, Dakar: tri senegalaj esperantistoj partoprenis la Tutmondajn Kongresojn de la Junaj Verduloj kaj de la Verduloj. Ni aktualigis la Tutmondan Charton de la Verdaj Partioj.

2014: Ekzistas Esperanto Komisiono ene de la Verda Partio en Francio EELV

La Federacio de la Europaj Junaj Verduloj montras sian sinprezenton ankaŭ en Esperanto kaj ni tradukis ilian Manifeston 2014, kiu trovigas sur ilia retejo: www.FYEG.org

Ankaŭ la Europa Verda Partio akceptis meti la eo-tradukon de sia Manifesto 2014 sur sian retejon.

La germana Ekologie-Demokrata Partio (ÖDP) akceptis rolon de Esperanto en sia Europa Programo (ankorau ne publikigita), kaj sinprezentas en Esperanto: www.oedp.de

2017: Global Greens, Liverpool: AVE havis informtablon pri Esperanto: www.globalgreens.org

2001, 2007, 2008, 2012, 2017 AVE-reprezentantoj partoprenis la kongresojn de Global Greens.

Elkoran dankon al tiuj kiuj agadas kaj voĉonas por la Verduloj.

Ni kontaktadas kun la MEP-oj. Ni diskutos kiajn paŝojn eblas proponi al ilia frakcio por antaŭenigi la rolon de Esperanto por helpi daŭripove, juste kaj demokrate solvi la EU-Babelan lingvoproblemon.

Ret-adreso de AVE: ave@verduloj.org ; retejo www.verduloj.org ; nia ret-letero: AVENO

Poshte: Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen. Sur la menciitaj retejoj indas serĉi „Esperanto“